

FRANCA

PRIEURÉ SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue Cl. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Redaktoro: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Asistinto: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie	49150 SAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon	59800 LILLE
Paranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Etienne d'Orves	54490 PIENNES

L.C.P.: Association Catholique Française pour l'Espéranto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sumo: 40 F. ====

==== N° 179 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== DECEMBRO 1993 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent sepre antaŭ la
5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

LE MOT DU PRESIDENT

Bientôt nous fêterons Noël et célébrerons la Paix promise par Dieu aux hommes. Cette paix ne s'établit pas seulement dans notre relation avec le Créateur, elle doit aussi exister de façon durable dans nos rapports avec nos frères humains.

C'est une idée voisine et similaire que les Rencontres Oecuméniques de Viviers avaient prise pour thème de leur semaine en juillet dernier. Pendant huit jours, des espérantistes appartenant, soit à l'Eglise catholique, soit aux diverses confessions protestantes, ont réfléchi sur l'acceptation de l'Autre. Les participants ont facilement dialogué ensemble grâce à l'usage de l'Espéranto et ont, aux dires de tous, vécu de concert une période de fraternité et d'estime réciproques.

Il n'est cependant pas facile, ni même évident, d'accepter l'Autre. Ce n'est pas en effet simplement de tolérance qu'il s'agit. Certes la tolérance est une vertu à encourager, mais il y a en elle un aspect passif qui n'apporte pas de chaleur humaine dans la relation avec l'Autre. Accepter celui-ci, c'est faire davantage; c'est le comprendre; c'est accueillir, sans préjugés, sa manière d'être différente de la nôtre, sa vision des choses étrangère à nos concepts, sa sensibilité éloignée de celle qui nous est propre. Il y faut beaucoup de doigté et d'amitié, car comprendre l'Autre, c'est l'accepter dans sa diversité, sans toutefois renoncer à nos idées et croyances personnelles.

Il ne saurait faire de doute que l'usage d'une seule langue précise et nuancée, comme l'est l'Espéranto, ne peut que faciliter un tel dialogue.

BONNE ET SAINTE ANNEE 1994 A TOUS.

A.B.

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Ni baldaŭ festos Kristnaskon kaj celebros la Pacon promesitan de Dio al la homoj. Tiu paco ekestas ne nur en nia rilato kun la Kreinto, ĝi devas ankaŭ daŭre ekzisti en niaj rilatoj kun niaj homfratoj.

Najbaran kaj similan ideon la Ekumenaj Renkontoj en Viviers pronis kiel temon de sia semajno en la pasinta julio. Dum sep tagoj, esperantistoj anoj ĉu de la Katolika Eklezio, ĉu de diversaj protestantaj Eklezioj, meditis pri la akcepto de la Alia. La partoprenantoj facile interparolis dank' al la uzado de Esperanto kaj, laŭ ĉies diroj, kunvivis tempon de reciprokaj frateco kaj estimo.

Tamen ne estas facile, ankaŭ ne evidente, akcepti la Alian. Fakte ne simple temas pri toleremo. Jes ja, toleremo estas kuraĝigota virto, sed en ĝi estas pasiva aspekto, kiu ne alportas homan varmon en la rilaton kun la Alia. Akcepti ĉi tiun estas io plia; por kompreni lin, akcepti, sen antaŭjuĝoj, lian sintenon malsimilan je la nia, lian opinion fremdan al niaj ideoj, lian sentemon malproksiman de la nia, necesas granda delikateco kaj amikeco, ĉar kompreni la Alian, tio estas akcepti lin en lia diverseco, tamen ne rezignante pri niaj personaj ideoj kaj kredoj.

Sendube, la uzado de unu nura lingvo preciza kaj nuancita, kia estas Esperanto, povas nur faciligi tian dialogon.

BONAN KAJ SANKTAN JARON 1994 AL ĈIUJ.

A.B.

+++++

MONTRU VIN, SINJORO

Venu, montru vin al mi,
Mi vidos vin, mia korĝojo,
Mi konos vin, kiel vi konas min,
Mi vidos vin, lumo de miaj okuloj.

Venu, montru vin al mi,
Mi vidos vin, mia korĝojo,
Mi finfine trovos vin, ho Dio mia,
Mi retenos vin, kiun mi deziregas.

Venu, montru vin al mi,
Mi vidos vin, mia korĝojo,
Lumigu miajn okulojn, ho dia Lumo,
Ke mi ne plu vidu la vantaĵojn.

Venu, montru vin al mi,
Mi vidos vin, mia korĝojo.

Sankta Aŭgusteno

+++++

MESAGO DE PAPO JOHANO PAULO II-a

Lia Papa Moŝto sincere salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto okazanta en Valencio kaj ilin kuraĝigas daŭrigi sian estimindan klopodon por realigi mondon, kie regu la interkompreniĝo kaj unueco.

Samtempe, la Sankta Patro instigas la partoprenantojn, kiuj reprezentas diversajn landojn, kulturojn kaj kredojn, sed parolas komunan lingvon, elmontri, per tĉa renkontiĝo la fratecon kiu, sen ajna diskriminacio, devus regi inter ĉiuj homoj kiel membroj de la granda familio de la filoj de Dio, kaj plifirmigi la personan kaj kolektivam konsciiĝon esti konstruantoj de la paco en siaj hejmaj medio kaj socio.

Kun tiuj ĉi deziroj kaj alvokante la Dian protekton al la laboroj kaj partoprenantoj de la kongreso, Lia Papa Moŝto plezuras disdoni la sopiratan Apostolan Benon.

Nome de la Papo,
G.B. RE

(el la revuo Esperanto n° 1051 (9) p. 143)

14,00: vizito al diversaj vidindaĵoj en Metz - butikumado
17,30: diservo
21,00: preĝvespero

Mardon, 17-an de majo

10,30: diservo

PROTOKOLO DE LA LASTA KOMITATKUNVENO

La kunveno okazis merkredon, 20-an de oktobro 1993, en la monaĝejo S-ta Jakobo 20, rue des Tanneries en Paris.

Partoprenis: P-roj Bourdon kaj Héroux, F-to Marmou, S-ino Vincent, S-roj Bessièrre, Colas, Despiney, Pons kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon F-ino Preux, malsana.

La pilgrimo en Lourdes bone sukcesis dank' al la partopreno de kvar ali-landanoj.

La programo de la venonta kongreso en Moulins-lès-Metz estas preta (p.3)

La financa stato de la asocio estas kontentiga.

La kongreso de 1995 okazos en Limoges. S-ro Pons prizorgas la aferon.

Oni studas la proponon de la Lyon-a grupo, kiu intencas organizi tutlan- dan kongreson en 1996; la komitato findecidas en oportuna tempo pri partopreno de FKEA en tiu kongreso.

En 1994, finos sian mandaton; P-ro Bourdon, S-roj Bessièrre, Colas, Despi- ney, kiuj rakandidatiĝas. Novaj kandidatoj anoncu sin ĉe F-ino Preux. Ili estas bonvenaj.

Artikolo pri la agado de la katolikaj esperantistoj aperis en la "Norman- da bulteno", organo de la normandaj esperantistoj. Tiu artikolo vekis intereson.

P-ro Héroux kaj S-ro Bessièrre raportas pri la ekumena kongreso en Viviers, pasintan julion. Pli ol 80 homoj, egalnombro katolikoj kaj protestantoj, ĝin par- toprenis kaj ĝuis la fratan etoson. La venonta ekumena kongreso okazos en Pollan- do en junio.

Oni ree bedaŭras la ne-aperon de Espero Katolika kaj esperas, ke solvo baldaŭ montriĝos.

Necesas eldoni novan varbilon por katolikoj. La komitato alvokas ĉiujn membrojn pri kunlaboro al la verkado de tia flugfolio, moderna kaj alloga! La provojn oni sendu al S-ro Bessièrre.

La venonta komitatkunveno okazos merkredon, 19-an de januaro 1994 en la monaĝejo S-ta Jakobo. Observantoj daŭre bonvenaj!

LA KRISTANA ORIENTO

La Virgulino MARIA kaj S-ta JOHANO: de Kalvario al Efeso

S-ta Johano verŝajne obeis la lastan volon de la mortanta Kristo kaj pri- zorgis Marian en Jerusalemo, eble ĝis 42, jaro de la persekutado fare de Herodo Agripa, persekutado, kiu disigis la Apostolojn, escepte Petron, ekster la Sanktan Urban.


Pri tiu disigo skribis Eŭzebio (265-340), historiisto de la unua Eklezio, laŭ kiu "Johano vivis en Azio kaj mortis en Efeso". Per tio, Eŭzebio reprenas, pri S-ta Johano, kion skribis famaj antaŭuloj el la II-a kaj III-a jc, inter ili S-ta Justeno (100-166), judo konvertiĝinta en Efeso ĉirkaŭ 133, kiu skribas en sia ver- kaĵo Dialogo kun Trifono: "Ĉe ni, viro nomata Johano, unu el la apostoloj de Kris- to, antaŭdiris en Apokalipso". Krome, S-ta Ireneo (130-208) asertas, ke S-ta Jo- hano verkis sian Evangelion en Efeso; s-ta Polikrato, mem episkopo en ĉi tiu urbo, memorigas al papo S-ta Viktoro (189-199), ke la tombo de S-ta Johano kuŝas en Efe- so; fine Klemento el Aleksandrio (+ 215) kaj Origeno (185-253) konfirmas la direjn de la antaŭaj aŭtoroj.

En la IV-a jc, S-ta Epifano (+ 403), devenanta el Palestino, kie li fon- dis monaĝejon antaŭ ol iĝi episkopo de Salamino en Kipro, iros pli malpreksimen ol siaj antaŭuloj por klarigi nian temon, kvankam tion li ne intencis.

Laŭ lia verkaĵo, Panariono, estis fakto evidenta por la kristana komun- mo, ke S-ta Johano ne nur vivis en Efeso, sed tie vivis kun la Virgulino Maria.

Panariono fakte estas severa kritikisto de la monaĝa regulo de la Agapetoj, tiuj monaĝoj, kiuj ĝuste aludis al la komuna vivo de S-ta Johano kun la Virgulino Maria en Efeso per mem kunvivi kun monaĝinoj.

= 6 - 2 1/2 =



ACCES

Par Autoroute :
 sortie Metz-Sud :
 direction Moulins-Centre
 puis : Préville
 rue du Château
 église

Par SNCF : Gare de Metz
 à la sortie, sur la place:
 prendre le bus n°31
 "Moulins-Mairie"
 1er départ : 6h40
 dernier départ : 18h38

NANCY

MOULINS lès METZ

ACCUEIL

Ermitage Saint Jean
 7, rue des Moulins
 57160 Moulins-lès-Metz
 Tél. : 87 60 02 78

ou prendre un taxi

C.C.P. Strasbourg 1946.74.M

Ne hazarde en la V-a jc la patriarko de Aleksandrio, S-ta Cirilo, decidas kunvoki en Efeso, nome de papo Celestino, la trian ekumenan koncilion (431), kies temo estis kondamni la Herezon de Nestorius kaj sekve proklami la dian patrinecon de Maria, kaj fiksi, kiel kunvenoj de tiu koncilio, la solan preĝojon en la mondo, kiu tiam estis dediĉita al la Beata Virgulino Maria, la Panagia ("Plene Sankta") de la grekoj.

En la unuaj jarcentoj de l' kristanismo, oni kutimis dediĉi preĝojn nur al sanktulo, kiu en tiu loko, vivis siajn lastajn jarojn aŭ ricevis la martiron.

Post la koncilio, la patroj koncilianoj sendis al la pastraro kaj fideluloj de Konstantinopolo leteron el kiu ni eltiras la jenon: "Nestorius, la malpia herezulo, post sia alveno en Efeso, en la loko, kie alvenis Johano la Teologo kaj la S-ta Virgulino Maria, Dipatrino kaj..." Al tiu kroma pruvo pri la ĉeesto de Maria en Efeso, ni aldonos pliajn certe pli malfruajn, sed interesajn, ol okcidentaj fantoj koncerne la restadon de Johano en tiu urbo.

La gaula episkopo, Gregorio el Tours (538-594), kiu meritplene la unua pritraktis la problemon de la Ĉieliro de la Sankta Virgulino, skribas: "En Efeso troviĝas la loko, kie tiu Apostolo (Johano) verkis la Evangelion, kiun oni legas sub lia nomo en la Eklezio. Supre de la najbara monto staras kvar muroj sen tegmento. Li loĝis tie, fervore preĝis..."

S-ta Vilibaldo, episkopo de Eischstadt en Germanujo, pilgrimis al Efeso inter 723 kaj 726. En lia vojaĝreporto, oni povas legi: "Post la vizito al la tombo de S-ta Johano, kaj al la groto de la sep Dormantoj kaj al la tombo de S-ta Maria de Magdala, (la pilgrimantoj) grimpis sur la monton, kie la sankta Evangeliiisto Johano kutimis preĝi, loko, kiun pluvo kaj sezonoj respektas..."

(daŭrigota)

VIVO DE JOHANA JUGAN (fino)

Saĝeco de F-tino Maria de l' Kruco (1805-1879)

Dum sia restado en la turo S-ta Jozefo, J. Jugan ofte montris sian saĝon jen al la novicinoj jen al aliaj fratinoj. En 1870, ŝi atentis pri la malgajaj militaj okazaĵoj. Simile, ŝi atentis pri la unua Vatikana koncilio, pri la venkopreno de Romo fare de la revoluciuloj batalantaj por unueca Italujo. Ŝi ŝatis la naturon, admiris la florojn en la parko. Pli kaj pli longe ŝi preĝadis. Novicino diris: "Ŝi vivis ĉeeste de Dio kaj ŝi ĉiam parolis al ni pri Li". Johana tre amis siajn maljunulojn; ŝi kutimis diri: "En niaj bonaj maljunuloj ni vidu Jesuon per la okuloj de la fido, ĉar ili estas la heroldoj de l' bona Dio". Kaj pri la mizeruloj: "Ili estas la suferantaj membroj de Nia Sinjoro".

Ŝi daŭre pripensis antaŭ ol agi kaj restis ege modesta. "Nur la otuloj plaĉas al Dio".

Post la 80-a jaro, ŝia vidpovo malfortiĝis, ŝiaj palpebroj paraliziĝis. Dum la lastaj jaroj, ŝi estis preskaŭ blinda. Ŝi diris: "La bona Dio min vidas; tio sufiĉas!" Malgraŭ tio, ŝi restis gaja kaj sprita.

Ŝi ofte serene parolis pri sia morto. Antaŭ ol foriri, ŝi spertis lastan ĝojon: la 1-an de marto 1879, Papo Leono XIII-a konsentis konfirmi la aprobon de 1854, kiu estis nur prova. Tiam, 40 jarojn post la humilaj komencoj en St-Sorvan, la ordeno nombris 2400 "Etajn Fratinojn".

Ŝi forpasis en aŭgusto 1879.

ŜIA MISIO DAURAS

1899: nekrologo agnoskas ŝin kiel "la unuan Etan Fratinojn kaj fondintinon de la Ordeno".

1902: aperas historio de la kongregacio verkita laŭ la instigo de la tiama estrino.

1936: en Rennes, oni malfermas diocezan proceson informiĝantan pri ŝia sankta fama. Oni transportas ŝian korpon de la komuna tombejo al la kriptoj de la kapelo. Dum la milito, la proceduro estis interrompita.

1970: oni ekpledas tiun aferon en Romo.

1979: oni prezentas al Papo Johano-Paŭlo II-a juĝon pri la ĉeesto de la virtoj de J. Jugan, kiu estas proklamita "kultinda".

Oktobro 1982: ŝi estas proklamita "beata".

La 10-a Ekumena Kongreso okazos en Gostyn, de la 9-a ĝis la 16-a de junio 1994

DEZIRO PRI EUKARISTIO

Mi intencis mem skribi al M-ro Prozidanto de la franca episkopa konferenco post lia interveno, okaze de la lasta publika kunveno, kiun mi legis en la dioceza Nancy-a bulteno. G. Montaron tion faris publiko kun sia kutima varvo, sia agemo, sia lojaleco kaj sia fideleco je la Eklezio.

Preskaŭ 62-jara, kormalsana, mi nun respondecas pri kvar paroĥoj, verŝajne baldaŭ sep. Kiam la deko?

Zorgigas min la deziro pri Eŭkaristio, pri proksimeco de la kristanoj al la aliaj, kaj mi kuras, kuras, kuras. Baldaŭ mi ne plu havos tempon por la preĝo, la legado, la daŭra formado, kaj mi krias mian senhelpon. "Mi vidis la mizeron de mia popolo", diris Dio al Mosko. Ĉu mi ankoraŭ havos sufiĉe da okuloj, koro kaj tempo por sensŭiĝi antaŭ la arda vepro?

R. DEGRELLE

(el Témoignage chrétien 10/07/1993)

KONGRESA ALIĜILU

Tondu aŭ kopiu kaj sendu al S-ino VINCENT napre antaŭ la 15-a de aprilo 1994.

NOMO KAJ VOKNOMO:

ADRESO:

NASKIGDATO (nur por infanoj):

* * * * *

Mi aliĝas al la kongreso en Moulins-lès-Metz kaj pagas al A.C.F.E.:

aliĝkotizo	F
restado:....tagoj po 190 F	F
kantikaro (50 F)	F
donaco (libervola)	F
Sumo	F

N.B. Bonvolu kunporti buŝ- kaj tualet-tukojn.

Mi alvenos en Metz per aŭto/trajno/aviadilo (1) la -an de majo je la horo kaj foriros la -an de majo je la horo.

Akompanos min personoj.

DATO

SUBSKRIBO

(1) forstroku la senutilaĵojn.

EVENTUALAJ RIMARKOJ KAJ SUGESTOJ:

